# KOMITATO-KUNSIDO de la 26a de januaro 2020
# 9:30 → 17:00

**0.1 Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj – 5 min**

Ĉeestas:

1. Didier Loison (DL), prezidanto
2. Maurice Juy (MJ), vic-prezidanto
3. Sébastien Montagne (SM), kasisto
4. Gilles Tabard (GT), sekretario — reprezentas federacion Limousin
5. Michael Leibman (ML), vic-sekretario — reprezentas federacion Rhône-Alpes
6. Raymonde Coquisard (RC), estrarano
7. Alexandre André (AA), komitatano
8. Claude Bensimon (CB), komitatano
9. Bernard Cornevin (BC), komitatano
10. Michèle Abada-Simon (MAS), komitatano — reprezentas FKEA
11. Didier Janot (DJ), komitatano — reprezentas GEE
12. Michel Dechy (MD), komitatano — reprezentas federacion Nordan
13. Pascal Vilain (PV), komitatano — reprezentas federacion Provence
14. Armand Salek (AS), komitatano, alvenas je la 10a07
15. Aleks Kadar (AK), komitatano, alvenas je la 10:13a
16. Jean-Lucien Mazeau (JLM), vic-kasisto, alvenas je la 11:00a

Ankaŭ ĉeestas nekomitatanoj :

1. Susanna Beglaryan (SB), respondeculo de la sidejo
2. Vincent Jacques (VJ)
3. Régis Fournier (RF)
4. Axel Rousseau (AR)

Ne ĉeestas sed donis sian voĉon :

1. Lucas Teyssier al JLM (LT sekvas rete)

Ne ĉeestas:

1. Xavier Godivier (XG)
2. Julia Hedoux (JH) al SM
3. Jesper Jacobsen (JJ)
4. Claude Nourmont (CN)
5. Flora Markov (FM)
6. Lucas Teyssier (LT)
7. Jean-Pierre Boulet (JPB)
8. Josette Ducloyer (JD)
9. Gilbert Stammbach (GS)
10. Marianne Pierquin (MP)
11. Florian Cezard (FC)

12. Marie-France Conde Rey (MFCR)

Xavier Godivier (XG) mesaĝas je la 11a05 : malsanas. Voĉo al CB.

**0.2 Elekto de prezidanto kaj protokolantoj – 5 min**

Prezidas DL.
Protokolas DL, SM, JLM kaj AA.

Protokolo de oktobro 2019 : mankas partoprenlisto. PV legas mesaĝon de CN. Estraro (DL) aldonos. Voĉdono pri ĝi okazos poste. Enretigos mankantajn protokolojn DL (helpos al GT ?). AS alvenas 10a07.

**0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj – 5 min**

MJ kaj RC rimarkas ke mankas klarajn tagordojn kaj protokolojn por bone sekvi la agadojn de la asocio.

**0.4 Dato de venonta komitato-kunsido – 5 min**

Traktota poste (vd. punkto **3.1**)

**0.5 Protokoloj de la pasintaj komitat-kunvenoj – 10 min**

DJ: Kiu zorgas pri publikigo de la protokoloj ĉe
https://esperanto-france.org/conseil-d-administration
→ mankas pluraj!
DL aldonos la liston de partoprenintoj de la pasinta oktobra komitato-kunsido kaj poste publikigos la mankantajn protokolojn de la antaŭaj kunsidoj.

**Sume 45 min (fino ĉ. la 10:15a)**

# 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

## 1.1 Prepari novan estraron – Diskuto 20 min (DL)

En Dovro ni devis elekti plurajn novajn estraranojn kaj tio tute ne estis antaŭvidita. Kiel eviti tiun problemon ĉi jare ? Kiel allogi kaj prepari kandidatojn ? Kian estraron bezonas Esperanto-France ?
Problemas la limo de 6 jaroj por la komitatanoj elektitaj de la membroj – ne por tiuj elektitaj de regionaj federacioj nek de fakaj asocioj. DL petas al la komitatanoj kandidatiĝi kaj kandidatigi aliajn kompetentajn kaj tempohavajn homojn por la venonta komitato. GT pretas verki alvokon por la venonta landa kongreso.

## 1.2 Aliĝilo 2019–2020 – informo 10 min (SM)

SM: 533 membroj aliĝis ekde oktobro (simile kiel en pasinta jaro, sed ne ĉiuj jam aliĝis 674 entute pasintjare)
Ni iomete modifis la prezentadon de la aliĝilo. Ĉu estis efike ? Ĉu ni ŝanĝu aliajn aspektojn por venontjare?
DJ: La aliĝilo 2019–2020 jam aperis. Pasintfoje venis proponoj pri korektoj, sed ili restis ignoritaj!
DJ sendu al Bruno por ricevon malneton decidotan dum la venonta KK dum jarkunveno.

## 1.3 Funkciado de la helpanta skipo en la sidejo – Diskuto 15 min

Ĉi-sube letero de Axel Rousseau de la 10a de decembro :
*Il y a 15 jours, je suis passé au siège d'espéranto france pour faire le bilan des problèmes que les bénévoles rencontrent. J'ai identifié 25 points d'amélioration avec eux. Ces points concernent des bugs, mais aussi des nouvelles fonctionnalités à développer et aussi des remarques sur l'organisation de la boutique.*
*Ce sont des choses un peu techniques et je vous mets la liste en dessous.*
*J'ai enregistré ces points dans une liste partagée avec Sébastien et Emmanuelle afin de suivre les améliorations possibles.*
*Dans les points qui sont un peu moins techniques, et pour lesquels on pourrait avoir l'aide de personnes extérieures, il y a la rédaction des procédures qui permettront d'avoir plus facilement de l'aide extérieure.*
*D'autre part, nous avons un souci technique quand une personne souhaite faire un don au Klubo 2000 qu'il souhaite répartir entre différents projets. Pour ce point là, éviter de choisir plusieurs projets différents dans le cadre du Klubo 2000 est une bonne solution.*

DJ: Je comprends que ce soit un peu compliqué de ventiler les dons, mais on ne va tout de même pas se plaindre que viennent plus de dons pour plus de projets!
On devrait encore avoir plus de projets et plus de financements! N'est-ce pas la raison d'être de notre association?
Si on suivait ce raisonnement, on pourrait aussi supprimer la possibilité de faire des dons!!!???

*Dans la liste ci-dessous, je n'ai mis que les titres des tickets de la liste ainsi que les mots clefs (arthur1, arthur2, bug etc.) Je pense qu'il pourrait être utile de refaire un point dans 6 mois pour voir l'évolution des problèmes et s'il n'y a pas de nouveaux problèmes. Les bénévoles du siège se sentent parfois isolés et peu soutenus par le bureau, mais je pense que faire une réunion comme celle que j'ai faite ou leur prodiguer une formation comme ce que Julia fera en février prochain leur permet de se sentir épaulés.*
*(...)*
*Seul le téléphone de Susanna fonctionne en la sidejo*
(...)
AA : ces fonctionnalités et mises à jour techniques du logiciel interne semblent plutôt être à l'ordre d'un groupe de travail plutôt que d'une réunion du CA.

SB informas la komitaton ke necesos homo – profesiulo – por arĥivado en la sidejo.

## 1.4 Renovigo en la sidejo – Informo 10 min CB

Lunde je la 9a metiisto ŝanĝos akvujon kaj aldonos akvovarmigilon.
Restos por fari farbado kaj aranĝado de la bretoj.

## 1.5 Elekto de reprezentanto Espéranto-France ĉe FEI — Decido 10 min DJ

DJ: Franca Esperanto-Instituto (FEI) http://franca-esperanto-instituto.net/ konsistas el 7 reprezentantoj de Espéranto-France, 5 reprezentantoj de SAT-Amikaro, kaj ĝis 3 membroj alelektitaj de la 12 unuaj.
EF devas nomumi siajn 7 reprezentantojn por la oficperido 2019-2022 (ni ne faris pasintjare, do devas fari nun).

DJ: Danke al aktivado de Renée Triolle, du novaj volontuloj sin anoncis : Pascal Vilain kaj Jean-Claude Roy.
Kvar el la nunaj pretas daŭrigi : Renée Triolle, Michel Dechy, Christian Lavarenne, Didier Janot (tri rezignis : Anne Jausions, Sylvain Barrier, Aleks André.)
→ Do ni havas 6 volontulojn por 7 lokoj
Noto : François Lo Jacomo kaj Jesper Jacobsen estas alelektitaj membroj (2 homoj por 3 lokoj)

Decido: **unuanime aprobite**

## 1.6 Elekto de reprezentanto Espéranto-France ĉe Greziljono—Decido 15 min (DL)

FLJ : Baldaŭ okazos renovigo de duono de la Komitato de Greziljono. Espéranto-France estis membro de la Komitato dum ok jaroj, kaj devis forlasi la komitaton en 2018 pro statuta limigo de deĵorperiodoj. Tamen nun, Espéranto-France povos rekandidatiĝi. Aliaj Komitatanoj ne plu povos rekandidatiĝi (interalie Bert Schumann), pro la sama statuta limigo de deĵorperiodoj. Mi ne scias, ĉu Xavier [Godivier] ĉeestos la Komitatkunsidon, sed ankaŭ mi, kvankam ne-Komitatano, povus veni al la kunsido por precizigi la aferon. La nuna situacio de la Kulturdomo estas profitdona finance, kaj ebligas konstrulaborojn, kiuj aspektis nefareblaj antaŭ kelkaj jaroj. Ekzemple tuta renovigo de la tegmento (unu kromdomo jam finita, alia baldaŭ farota). Ĉambro alirebla per rulseĝo estas nun konstruata. La Esperanto-staĝoj bone funkcias, ni estis pli ol 70 en la lasta staĝo Aŭtune, kun alilandaj instruistoj (inter kiuj la Esperantisto de la jaro Anna Löwenstein). Ludonoj multe progresis en 2019. La sola problemo estas, ke tre granda kvanto de laboro estas farata de malgranda teamo, kaj se unu el tiuj plej aktivaj pro iu ajn kialo ne plu povos same kontribui, estos ege malfacile trovi anstataŭanton. Eĉ por havi kompletan Komitaton ni devos klopodi, kaj varbi kandidatiĝojn. Do estos bone, se Espéranto-France povos denove kandidatiĝi en la Komitato kaj pli ĝenerale se ni trovos novajn aktivulojn por plilarĝigi la homan bazon de la agado. Pli da detaloj, se necese, mi povos alporti

al la Komitatkunsido se vi entagordigos tiun ĉi punkton kaj invitos min. Kandidatiĝo eblos ĝis marto.

GT substrekas la gravecon de la Maison Culturelle de l'Espéranto Greziljono por praktiki Esperanton.

1. **Ĉiuj komitatanoj de Espéranto-France aprobas la ĉeeston de la asocio** kiel membro en la komitato de Greziljono.
2. En la komitato de Espéranto-France ne troviĝas kandidato por reprezenti la asocion. Ni sendu alvokon al kandidatiĝo por reprezentanto ĉe la komitato de Greziljono. Intertempe DL pretas ĉeesti la venontan komitaton de Greziljono.

### 1.7 Elekto de reprezentanto Espéranto-France ĉe EEU — Decido 10 min (AK)

Eŭropa Esperanto Unio kuniĝos en Frankfurto ĉe Odro (29an de majo) kaj Słubice (1an de junio), samtempe kun la germana kongreso. Ĝi petas de la naciaj asocioj kandidatojn por partopreni la Asembleon kaj poste partopreni la estraron de EEU (vidu *Eŭropa Bulteno* n-ro 198 de decembro 2019:
https://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=506&filename=eb-198-2019-12.pdf )
La ĝis nuna reprezentanto de EF ĉe EEU estas AK. Li pretas lasi tiun postenon al dinamika volontulo. VJ kandidatiĝas.Se la statutoj de EEU permesas tion, GT kaj MD pretas iĝi anstataŭantoj de VJ.

La komitato **unanime aprobas** Vincent Jacques kiel reprezentanto.

| | | |
|---|---|---|
| ■ | **Sume** | **95 min (fino ĉe la 12:30)** |

(Manĝpauzo, rekomenco je la 14:00a)

## 2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Klubo 2000 en 2019–2020 - Diskuto 20 min JLM, SM

Sur la aliĝilo 2019-2020 aperas la jenaj projektoj :
• renovigado de la tegmento de la sidejo (nia partopreno: 18 000 EUR !) jam alvenis pagopetoj por la laboradoj en la komuna korteto
• financi videojn pri Esperanto sur la Youtube-kanalo “Astrolabe” de Poisson Fécond (pli ol 2 milionoj daabonantoj). Ligilo al tiu ĉi reklamo :
https://www.youtube.com/watch?v=T1_AEfAS9tY#t=1m – en januaro 2020 pli ol 67 000 vidoj
• eldoni flugfolion « Espéranto, la langue du monde » por la 12–30jaraĝuloj: kolegioj / liceoj / universitatoj

Remarque de AA : un unique dépliant pour trois publics cibles différents semble contre-productif. On peut imaginer par exemple axer davantage sur les applications de rencontre (Amikumu) pour les majeurs (fac), plutôt sur les sites d'apprentissage (Duolingo, Lernu) pour les lycées, et sur les choses plus divertissantes (chansons, bande-dessinées, etc.) pour les collégiens.

## 2.2 L'espéranto dans le système éducatif français – Raporto 10 min MJ/AA

MJ legas retropektivon pri iliaj klopodoj ĉe DGESco (direction générale de l'enseignement scolaire, en 2017), FCPE (fédération des conseils de parents d'élèves, en 2018) kaj PEEP (fédération des parents d'élèves de l'enseignement public, en 2019), kaj ĉi-jare CNED (centre national d'enseignement à distance). Ja pro la reformo de la instruado en mezlernejo, ĉiu lernanto povas trapasi "option langue" pri ajna lingvo kondiĉe ke tiu lernanto sekvu lecionojn ĉu en lernejo, ĉu pere de CNED. La ideo estis do peti de CNED perkoresponda instruado de Esperanto. Tamen tiuj kursoj postulas monon, kaj laŭ CNED por ke la buĝeto estu ekvilibra, necesas havi po 100 lernantoj ĉiunivele. Kaj plie de tio, la lingvaj kursoj ofertataj de CNED ĉefe dependas de la decidoj de DGESco.

Du rezultoj, agadoj farendaj:
1. Reklami al instruistoj por ke ili petu al CNED instrui Esperanton pere de ĝi https://www.cned.fr/media/701818/enseignant-cned-2014.pdf
2. Ke lernantoj sciigu al CNED ke ili deziras lerni Esperanton.

MAS: ene de privataj lernejoj eble estos pli facile enkonduki Esperanto-kursojn, ĉar la estraroj de tiaj lernenoj mem decidas la kurso-enhavojn.
BC proponas fari videon por la instruistoj mem.

## 2.3 Volontulo por zorgi pri Afrika Solidareco – Diskuto 10 min

Kiu pretas anstataŭi Jeanne-Marie Cash por esti en kontakto kun la afrikaj petantoj, kun UEA, kun SAT-Amikaro?
AK proponas ke la sidejo kontaktu la afrikan komisionon de UEA kaj ties estraranon: Jérémie Sabiyumva.
Vd. ankaŭ https://www.esperanto-afriko.org/

## 2.4 Agado ĉe Unesko – Diskuto 20 min FLJ/RT

Ĝis nun la delegacio ĉe Unesko en Francujo estas François Lo Jacomo, Barbara Despiney, Renée Triolle. DL baldaŭ anstataŭos Renée Triolle en la triopo da homoj en rilato kun Unesko. Li estos en kontakto kun la delegacio estrata de FLJpor ekscii pli pri la nuntempaj agadoj. Porinforme, lasta interveno de François Lo Jacomo ĉe Unesko:
https://www.youtube.com/watch?v=WVxhhcQC-JU

Historie: Esperanto estas en la listo de nemateriaj kulturaj heredaĵoj de Pollando ekde novembro 2014 kaj ankaŭ nemateria kultura heredaĵo en Kroatio ekde februaro 2019. La celo estas ke Francujo starigu oficialan demandon, por ke Esperanto fariĝu parto de la nemateria heredaĵo de la homaro. Tio flanke helpus la projekton ĉe Edukada ministrejo. Laŭ Code de l'éducation, nome:
Article L321-10 (p. 99) : *Les langues [...] appartenant au patrimoine de la France, leur enseignement est favorisé prioritairement dans les régions où elles sont en usage.*

## 2.5 Ĝemelaj urboj – Prezento 10 min RC

Telefona diskuto kun UEA, kun Berlino, Romo, ktp.
Ni aldonu tekston de RC.
JLM proponas videokunsidojn kun la gxemelurboj de Parizo.
PV havis kontaktojn kun la ghemelurboj de Saint-Raphaël, nun de Hyères
AA: la urbo Remso estas en kontakto kun unu el siaj ĝemelaj urboj, Nagojo en Japanio.
https://www.reims-esperanto.fr/#h.p_gltbh4-qxxF-
MJ: ankaŭ Sarlat kaj Trogir (Kroatio).

## 2.6 Poezio tut'libera – Raporto 5 min GT

GT informas ke en novembro okazis, en la urbodomo de la 5a distrikto de Parizo, ceremonio kie oni disdonis 3 premiojn al esperantistaj junuloj el Brazilo (Porto Alegre), Parizo kaj Bretonio.

## 2.7 Projekto Multlingva Akcelilo – Diskuto 10 min GT

Porinforme:
https://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=502&filename=eb-194-2019-07-08.pdf
(paĝo 3)
La projekto Multlingva Akcelilo, por gelernantoj 8-9jaraĝaj, estas nun je la fino de la unua fazo.
La projekto ricevis subtenon 250 000 EUR de Erasmus+.
Ĉu ni povas uzi kaj diskonigi ĝin por bazaj lernejoj?
CB : Henri Masson sendube havas multe da informoj pri la propedeŭtikaj aspektoj de Esperanto.
AA : La enhavo de tiu projekto jam estas tradukita al kelkaj eŭropaj lingvoj, sed bedaŭrinde ĝis nun ankoraŭ necesas traduki ĝin ankaŭ al la franca (vd. punkto **4.3**)

## 2.8 Bilanco pri subtenantoj kaj apogoj de Eo-Fr – Diskuto 60 min MJ/JLM/DL

[traktata matene je la 11:00 pro la alveno de Vincent Jacques (VJ)]
DL prezentas VJ, prezidanto de la movado «Esperanto por Eŭropo» kreita ĉ. septembro 2019 (sed jam ne registrita nun). La celo de tiu movado estas plikonigi Esperanton al la ĝenerala publiko cele al uzado de la lingvo en Eŭropa Unio ; dum la lastaj kvin monatoj aperis ĉ. 40

artikoloj (inkluzive ĉe *Huffington Post*) danke al la laboro de dugazetaraj ataŝeoj (kostas po 2300 €HT monate). La asocio ege dankas al VJ pro la efika laboro kaj sindonemo.
Maurice Juy proponas (re)kreadon de Commission "Relations extérieures", agnoskon kaj subtenon de la laboro de VJ; VJ konsentas kunlabori kun (aŭ ene de) Esperanto-France, li estas malfermata prezidi tian komisionon.
JLM proponas valorigi tiun elspezon en niaj bilancoj kaj malfermi kontolinion por donacoj tra Kubo 2000. Ekz iel : [https://soutenir.framasoft.org/benevolat](https://soutenir.framasoft.org/benevolat)
CB konsentas kaj konsideras ke tiuj agadoj necesas por instigo de homoj veni al niaj kursoj; plie ĝi povas esti kialo aliĝi al la landa asocio.
MD same miras kaj ĝojas ke tiaj iniciatoj helpos al la asocio ke junaj “novaj” homoj alvenos al ni por lerni la lingvon.
DL montras ke la statistikoj de la retejo de EF plialtiĝis ekde septembro, eĉ multe tuj post reklamoj ĉe Jutubo.
VJ konsilas pagi por reta reklamo ekzemple en Facebook kaj metodon t.n. « retargeting » : homo kiu vizitas la retejon de Espéranto-France ricevos kuketon, kiu poste aperigos reklamojn pri la asocio al tiu vizitinto de la retejo.
DL proponas ke VJ kontaktu Emmanuelle Richard por pripensi pri agordoj de la retejo.
PV: ni ne forgesu ke alia agado estu plialtigo de la nivelo de la francaj esperantistoj.
[statistikoj de homoj kiuj posedas KER-ekzamenon:
[https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj](https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj)]
JLM : [proksima punkto KK] Ĉu UFE deziras sin doni monajn/kvantotajn/ekonomiajn celojn pri strategiaj punktoj por Esperanto (vivo de la membroj, videbleco, komercigado) kaj disdividi ilin tra la reto de asocioj kaj aliaj partneroj? Ekzemple en 2020, UFE demandas al ĉiu federacio ke ili aperigu du, tri, kvin… aritkolojn, 1 radio-intervjuon, …
CB : ni devas unue demandi al la federacioj kaj poste pridiskuti en la komitato.
DL rimarkigas ke la federacioj jam faras laboron ĉe lokaj ĵurnalistoj kaj aperas preskaŭ ĉiusemajne lokaj artikoloj.
MJ, JLM kaj VJ faros proponon por venonta KK ; la ĉeestantoj aprobas la agadon.

## 2.9 Pro la Briteliro aperas novaj eblecoj: kiel agi je eŭropa nivelo?– Diskuto 10 min GT

GT: nun en diversaj niveloj eblas fari agojn ; ni jam provis atingi partiojn kaj ili estis tre malbone akceptitaj. Sed ML faras bonan laboron ĉe la Verda partio. La homoj spontane diras “*Jes, estas problemo ke la angla restu la ĉefa lingvo de Eŭropo*”.
ML: Estas 20 homoj en komisiono de Europe Écologie Les Verts. ML kandidatiĝis por esti ilia reprezentanto ĉe la Eŭropa Verda partio sed ne estis elektita. Dum tiu periodo li kontaktis plurajn personojn el diversaj landoj. Li provas diskonigi Esperanton en la Eŭropa Parlamento, inkluzive prezentante projektojn de instruado en lernejoj.
GT: ni devas kontakti ĉiujn deputitojn ĉe franca parlamento kaj eŭropa parlamento.
MJ: ni profitu por skribi nome de Espéranto-France, petante ke ni uzu Esperanton anstataŭ ol la anglan, ĉar tiu lasta estos la gepatra lingvo de nur 3 % de la partoprenantoj.

## 2.10 Enpaĝigo de *Le Monde de l’Espéranto* – Diskuto 10 min CN

ER zorgas pri tio kaj daŭrigos per nova versio de softvaro (kostas po 20 EUR monate).
CB daure enmetas en nia retejo.

## 2.11 Meetup Pro pour Communauté Espéranto – Diskuto 10 min JLM

Kiel antaŭeniras la projekto ?
JLM : mi proponas forigi la punkton, ĉar la financmaniero de Meetup Pro ne estas kongrua kun nia buĝeto (tre multekosta).

## 2.12 Propono de traduko de bildstrio *Donjon Zénith* Decido 15 min AR

Informoj de AR : nous avons reçu de la part des éditions Delcourt un message d'un espérantiste qui les avait contactés pour publier une traduction d'une bande dessinée, *Donjon Zénith* (dont Delcourt possède les droits). Bien évidemment, Delcourt n'édite qu'en français et vend les droits à d'autres éditeurs pour les autres langues. Espéranto-France a les droits pour la BD *Tous super-héros* que Michèle Abada-Simon a traduite. J'ai contacté le traducteur et j'ai appris qu'il s'est fait aider et relire par Thierry Tailhades et Andrée Bertrand (par ailleurs correctrice d'ikurso).
*Donjon Zénith* est une « saga » (7 volumes actuellement, premier tome en 1998) écrite par plusieurs dessinateurs illustres comme Lewis Trondheim et Joan Sfar (connu pour avoir fait le *Chat du Rabbin* ou encore le film sur Gainsbourg : *Gainsbourg, vie héroïque*). Cette saga a été publiée à 800 000 exemplaires, moderne d'aspect.
L'idée serait de la publier dans les mêmes conditions que *Tous super-héros*, c'est à dire 1000 exemplaires pour un budget d'environ 4500 € et des ventes prévisionnelles à 9000 € (sachant qu'on souhaite à la fois les vendre le plus vite possible pour avoir un retour sur investissement, mais aussi le plus lentement possible pour pouvoir proposer aux nouveaux espérantistes dans 10 ans différents choix de bandes dessinées à acheter). En français, les exemplaires se vendent à 11,95 €. Il suffit donc de vendre environ 600 exemplaires pour être à l'équilibre.
Ĉefa problemo: ĉu estas loko en la kelo?

La komitato **unanime aprobas la eldonon** de tiu bildo-strio.

## 2.13 Vendo de libroj per Amazon kaj e-librovendejoj – Decido 20 min AR

AR provis vendi *Metodon 11* per Amazon, sed tiu ne agnoskas nian strikodon. Ĝi vendas nur bedaurinde malnovajn metodojn. Tial AR proponas vendi elektronikajn librojn, sen problemo de stokado kaj sendado tra la sidejo. Tio kostos neniun monon al la asocio, nur postulos tempon por krei la PDF-version. JLM demandas ĉu rimarkoj de la desegnisto estis prenitaj por la venonta eldono.

Pri la produktado kaj vendado de elektronikaj versioj de la *Metodo 11* kaj Esperanto-libroj per retaj vendejoj kiel Amazon, **4 sindetenas, ĉiuj aliaj aprobas.**

- Sume 140 min

# 3. KOMUNUMO (kongresoj, ...)

## 3.1 Kongreso de Eo-France 2020 – Decido 20 min RC / DL

La kongreso ne povos okazi en Liono. Ĉu nur landa membrokunveno en Parizo ? Kiam ? Urĝas fiksi daton.
DJ: Ĉu ni bezonas fizikan membro-kunvenon? Ĉu eblas sendi rete/poŝte la raportojn, kaj proponi retan/poŝtan voĉdonadon?
RC: Urĝegas ankaŭ labori pri agadraporto, financa raporto, elektoj de komitatanoj, sendado al la membro *unu monaton* antaŭ la membrokunveno. Kompreneble ni devas okazigi fizikan membro-kunvenon. La poŝtaj tarifoj altiĝis, kiel kutime... Ni ne elspezu la monon de la asocio ....Mi rememorigas ke dato kaj loko estis jam fiksitaj oktobre 2019 .... Ni parolis pri Ĉieliro aŭ Pentekosto 2020 ..... ???

DL: post la venontaj balotoj, estos nur unu urbestro kaj urbodomo por la 4 centraj distriktoj de Parizo. Pro tio ili ne scias kie estos la “nova” domo de asocioj. Pro tio estis malfruo de respondo pri rezervado de salono. Tamen nun finfine la estro certigis ke la nuna domo de la asocioj povus iĝi la loko por la venonta membro-kunveno, se ne ili proponos alian salonon. Li proponis kelkajn datojn, inter kiuj Pasko (kongreso de SAT-Amikaro) kaj Pentekosto (Germana Esperanto-Kongreso). Ĉar ne okazos tradicia landa kongreso, povus okazi nur dutaga membro-kunveno / komitato-kunsido sen “vera” kongreso, la 13an–14an de junio.

**La komitato aprobas la 13an/14an de junio** en la domo de asocioj de la 3-a distrikto / nuna urbo-domo de la 4-a distrikto.

## 3.2 Kongreso de Eo-France 2021 – Decido 20 min MJ/RC

La GEP (Groupe Espérantiste Périgourdin) proponas fari ĝin en Trélissac apud Périgueux dum Ĉieliro 2021 (de ĵaŭdo la 13a de majo 2021 ĝis dimanĉo la 16a majo 2021).
RC: Ĉu la grupo decidos okaze de la februara kunsido aŭ jam decidite ?

Demandoj de Maurice :
Nous proposons AG UFE le samedi matin, et komitato-kunsido l'après midi.

1. À cette occasion, UFE prévoit-elle la mise en place d'un libro-servo ? oui
2. Faut-il proposer éventuellement un KER-ekzameno ? Si oui, fournir les infos pour cette organisation. oui

3. Faut-il proposer à d'autres groupes de profiter de l'occasion pour faire leur propre AG ? Si oui, UFE fournit les adresses. Cela pourrait faire déplacer plus de personnes. oui
4. Espéranto-France dispose-t-elle de supports de badge, si oui, combien ? oui

RC memorigas ke ŝi estas membro de la estraro pri kongresoj kaj estus devinta ricevi tiujn demandojn rete cele plene plenigi sian rolon kiel kutime.

**La komitato unanime aprobas la lokon kaj daton**.
Eblos viziti la groton de Lascaux.

**Sume 40 min**

# 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

## 4.1 Renkontiĝo por korektantoj de ikurso – Diskuto 5 min AR

Axel Rousseau proponas renkontiĝon en la sidejo sabaton la 4an de aprilo, de la 10:00-a ĝis la 18:00-a.

## 4.2 Manlibro por instruado en lernejoj – Diskuto 10 min

## 4.3 Alvoko por traduko de la metodo Multlingva akcelilo 5 min AA

GT pretas partopreni en la tradukado de tiu metodo.

- **Sume 20 min**